

Numero: 282.  
Novembro: 2015.

23-a jarkolekto

# Literaturaj Folioj

# VESPERTO



Redaktanto  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400  
Telefona: 06/20/497-03-64  
Retadreso: [apatikb111@gmail.com](mailto:apatikb111@gmail.com)  
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO  
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

## Frapo al ESPERANTO

Ni ankoraŭ bone rememoras pri la jaroj 70-aj, 80-aj, kiam la Zamenhofa lingvo floris en Hungario. Tiutempe ĝi estis ŝtate subtenata. En tiuj ĉi „feliĉaj” jaroj en nia lando estis eldonitaj multegaj Esperantolingvaj libroj, gazetoj. Oni povis diri, ŝajnis baldaŭe alvenos la „lasta venko” kaj nia amata lingvo konkeros la tutan mondon. Ĝi fariĝos la dua gepatra lingvo de la homaro.

Ankaŭ mi tre kredis ĝin kaj entuziasme mi disvastigis „la ideon”. Ne eble – mi pensis – Esperanto falu kaj la homoj ne komprenu ĝian sencon, ilin ne allogu la lingva facileco kaj ĝia logiko.

Stultulo estas tiu, kiu ne ellernos ĝin kaj anstataŭ Esperanto tiu lernos fremdajn, naciajn lingvojn.

Kiom belega estis la estonto. Ni tre esperis kaj preskaŭ blinde kredis la sukceson.

Intertempe okazis politikaj ŝanĝiĝoj. La lando, eĉ ĉiuj landoj de la iama socialista tendaro malfermis pordon al okcidento kaj komenciĝis la transformiĝo el socialista al kapitalista sistemo.

Komence ni geesperantistoj ĝojegis. Fine ankaŭ antaŭ ni malfermiĝis la landlimoj. Ni povos vojaĝadi eksterlanden libere, kiel la okcidentanaj geesperantistoj.

Ni denove esperis.

En la komenco eble neniu pensis tiu ĉi „granda libeco” alportos al ni rivalojn. En la lernejoj anstataŭ la rusa oni komencis instrui la anglan, la germanan kaj aliajn lingvojn.

Poste la homoj amase iris eksterlanden por labori. Komprenable ili deziris ellerni la lokajn lingvojn.

Verdire estis ankaŭ pozitivaj rezultoj. En Hungario nur tiu altlerneĵano aŭ universitano ricevas diplomon, kiu posedas almenaŭ unu mezgradan ŝtatan lingvoekzamenon el iu lingvo. Oni povis ekzameniĝi ankaŭ el Esperanto kaj tial multaj gestudentoj elektis ĝin kaj faris sukcesan lingvoekzamenon.

Jes, eble nun diras: tio ĉi estas venko. Malgraŭ tio mi opinias, ni ankoraŭ estas malproksime de „la lasta venko”

Tiuj ĉi ekzamenigitaj personoj malaperas por ĉiam post la ricevo de la diplomo kaj ilin plu ne interesas la Internacia Lingvo. Ankaŭ ili lernas iun mondlingvon, ĉar laŭ ili ĝi estas pli utila, multfoje devigita al la laboro.

Nu, kion fari en tiu ĉi situacio. Estus bone kredi, tio ĉi estas nur malbona sonĝo kaj ni baldaŭe vekigiĝos.

**-Redaktanto-**



## Anserino

En la birdokorto erupciis granda diskuto, kiam alvenis anserino. Ĝis nun ankoraŭ ne estis tia kortobirdo.

La kokinoj kunla koko tuj kuregis por akcepti ĝin. Sed la anaso flankentiriĝis kaj ekgrumbladis en la ombro de la alta juglandoarbo:

-Kiu estas tiu ĉi monstro? Mi ne komprenas la dommastron, kial li venigis en la birdokorton tiun ĉi estaĵon. Rigardu ĝian plumaron. Ĝi estas neĝoblanka. Min timigas ĝia longa kolo kun eta kapo. Ho kaj ĝia lingvo tute nervozigas min. Kion signifas ga-ga? Mi ne komprenas ĝin. Kato, mia kara amiko, vi jam delonge loĝas ĉe la domo. Ĉu vi komprenas tiun ĉi strangan lingvon? – ĝi turnis sin al la proksimiĝanta maljuna kato.

-Mi ne komprenas, sed onidire ĝi estas gako-lingvo. Ĝis nun mi ne aŭdis pri ĝi.

-Ĉu gako-lingvo? Strange. Ĝi ne povas esti bona lingvo. La mia la kvako-lingvo estas la plej bona en la tuta mondo. Ĝi estas pli bona, ol la miaŭa lingvo.

Ekaŭdante tion ĉi la maljuna kato tuj forlasis la anason kaj kolereme ĝi murmuris.

-Mi ne kredas vin. La miaŭa lingvo estas disvastiĝinta tra la tuta terĝlobo.

La anaso trotetis al la anserino kaj ĝi bone rigardis la novan loĝanton.

-De kie vi venis? – ĝi demandis scivole.

La anserino levis siajn okulojn al la demandanto kaj fine ĝi diris:

-Ĝis nun mi loĝis en fora vilaĝo kaj antaŭ nelonge aĉetis min la dommastro.

-Vi devos ellerni mian lingvon, se vi deziras fariĝi la egalrajta civitano de birdokorto.

-Ja mi jam havas propran lingvon, kial lerni alian? Morgaŭ alvenos miaj kunuloj kaj eble ni estos en plimulto. Kiom kune vi estas anasoj?

La anaso serioziĝis kaj ĝi komencis balbutadi. Ne gravas kiomope vi estos. Nia lingvo estas la plej bona tra la tuta mondo. Ankaŭ vi devos ellerni ĝin...

-Kio okazos al ni, se mi ne ellernos ĝin? – la anserino interrompis la kvakadon. – Ĉu ni ne rajtas uzi nian propran lingvon?

-En la birdokorto nia lingvo estas la oficiala.

Ĝi apenaŭ povis fini la parolon, ĉar ekaperis la hundo kaj ĝi ekbojis montrante siajn dentegojn al la ansero:

-Avinjo ansero, ne parolu stultaĵon! Tie ĉi ĉiu scias en la bordokortola unusola oficiala lingvo estas mia lingvo. Vi ĉiuj tuj komencu lerni la bojolingvon.

La anserino kaj anaso interrigardis. Ili ektimiĝante de la granda hundo forrapidis.

**-Ŝaŝa-**



# Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-  
XVII-a

Jam preskaŭ plenumiĝis la amdeziro, kiam akra sonorigado interrompis la intiman momenton.

-Lunpolico! Tuj malfermu la pordon! Se vi ne obeos ni perforte enpenetros.

Johano ege ektimis. Ŝajne ankaŭ Izabela fariĝis nervoza.

-Kio okazis? – li demandis ekscitite. – Kion volas la polico?

La onklino ekprovis malaperigi la nepermesitan muzikon. Ŝi timeme kriis:

-Mi jam malfermos la pordon. Bonvolu atendi iom. Mi vestiĝis.

Du muskolaj policistoj staris ĉe la pordo.

-Sinjorino, vi aŭskultis nepermesitan muzikon. Laŭ la lunleĝo paragrafo 999/2207 vi kun tiu ĉi sinjoro krimfaris. Ni devas aresti vin.



-Sinjoro policisto – lementis la onklino Izabela – mi petegas, ne faru tion. Mia nevo estas sur Luno unuafoje kaj hazarde mi uzis tiun ĉi kodon. Mi bone scias, ke ĉi muziko estas nepermesita. Mi petegas, sinjoroj policistoj. Ĉu vi povas pardoni al ni?

-Mi ege bedaŭras, sinjorino, ni devas plenumi la ordonon. Bonvolu sekvi nin. Klarigu vian krimfaron por la tujkondamno-tribunalo. Ili decidis pri vi.

-Onklino, ĉu nun ni estas aresitaj? – demandis Johano. – Mi estas senkulpa. Mi scias pri nenio. Kio estas nia kulpo?

La onklino Izabele aŭskultis profunde kaj ŝi ne respondis al sia nevo.

Ili vestis matelon kaj ili ekiris post la du policistoj. Antaŭ la domo staris arĝenta policaŭto, kiu veturigis ilin al la Lunpolicejo, kiu estas sur la alia flanko de la planedo. Sur tiu ĉi teritorio de Luno grandparte estis nur publikaj konstruaĵoj, fabrikoj kaj uzinoj. Ĝi ne estis tiom da multaj bele konstruitaj domoj. Vere en la malproksimo estis videblaj altegaj duonpretaj konstruaĵoj. Onidire tie estos nova, moderna urbo.

El tio Johano apenaŭ vidis ion. Lian cerbon okupis la timo. Kio sekvos nun? Apenaŭ li liberiĝis el la terura prema aventuro kaj nun li denove estas minancata fare de polico. Ja, li faris nenion. Li nur ripozis nenion sciante pri tiu ĉi nepermesita muziko.

La onklino Izabela estis konfuzita kaj ŝi ne kuraĝis rigardi al Johano. Certe ŝi bonege konis la postsekvojn. Ne multaj krimfarantoj sukcesis eviti

por ke li aŭ ŝi ne estu ekzalita al la fora, senviva planedo Pluto. Preskaŭ ĉiutage eblis legi informojn pri tiaj kazoj. La lunanoj ne povas kontraŭstari al la allogo. La travivaĵo, kion donas ĉi muziko estas eksterordinara.

Dio scias, kio estus okazinta al Johano, se intertempe ne alvenus Lunpolico.

Nun ili estas en la lunpolicejo kaj la du policistoj gvidis ilin en malhelan ejon, kie estis nur kelke da fiksitaj seĝoj. Meze de la plafono lumis pala lampo. Al Johano tiu ĉi jam estis tre konata. Kvazaŭ li jam vidintus ĝin antaŭ nelonge, kiam li estis en tiu terura kaj timiga kelo.



Ankaŭ tie ĉi estis malvarmo. Ĝenerale sur Luno en la oficejoj kaj en aliaj similaj ejoj estas malvarmo. Li ne komprenis kial? Tio ĉi estis por li ege stranga.

Krom tio en la tuta konstruaĵo estis granda silento. Kiam la du policistoj ŝlosis la pordon ili restis solaj.

-Kara onjo, kial ni estas tie ĉi? – li demandis iom nerveze, ŝajne ankoraŭ li ne resaniĝis el la antaŭa aventuro.

La oldulino unue rigardis al li kaj ŝi ekprovis trankviligi Johanon.

-Ne ĉagrenu, baldaŭe ni liberiĝos kaj ni povos iri hejmen. Certe tio ĉi estas nur miskompreno. Ne timu! Post kelkaj horoj ni denove estos hejme.

Sed ne tiel ŝajnis, ke oni volis liberigi ilin. La tutan nokton ili pasigis en tiu ĉi malvarma, malbonodora ĉambro. Neniu venis por priaŭskulti ilin.

Ili dormetis sidante sur la malmola seĝo. En ĉiu kvaronhoro li vekiĝis kaj atendis la liberiĝon.

La minutoj tre, tre malrapide pasis. Kvazaŭ la tempo estus haltinta por ĉiam.

-daŭrigota-



# Poezio

Amiko, ne hontu ekpreni vian plumon kaj verki poemojn! Ne ĝenu, se vi ne estas ankoraŭ preta poeto!

Sonu de sur viaj lipoj la belaj vortoj! Vian poezion bezonas Esperantujo! Estu la heredanto de multaj grandiozaj esperantistaj poetoj, kiuj pliriĉigis nian literaturon.

Eble iam ankaŭ viaj poemoj plezurigos la legantojn kaj aŭskultantojn.

Verki en Esperanto estas ĉiela sento. Morgaŭ viaj versoj disvastiĝos tra la tuta mondok aj viaj sentoj radios sur ĉiu kontinento.

---

## Erzsébet Tuboly

### Krepusko

Jam vesperiĝas.  
Laca abelo dormas  
En florkaliko.



### Ioma mia hajko...

Finas septembro.  
Pale flavan folion  
Kundancas vento.

### Junio

Somer' senpluva.  
Dezert' sur kampoj ĉie.  
Dezert' en koroj.



## Tiel estas ...

La Tempo fluas.  
Ni pli kaj pli malmultas  
Ĉirkaŭ la tombo.

## Sonĝo

Diamantvoje  
Mi iradas solece.  
De kie? Kien?

## Somervespere (hajko)

Dolĉe odoras  
La florantaj tilioj,  
Kaj mi...solecas.



## Denove vintro

Revenis vintro.  
Sovaĝe furiozas.  
Frostas birdetoj.

Foras promes' printempa.  
Froste ploras burĝonoj.



# Por infanoj

## Krajonokoboldo



Peĉjo ne ŝatis lerni. Lin tre timigis la skribo de la alfabeto. Li ne komprenis, kial ekzerci la literojn mane, kiam jam ĉiu homo havas komputilon.

Liaj gepatroj ĉiutage skribigis per li literojn en kajeron por ke li ekzercu ilin.

Neniel sukcesis la literoj. La kajero aspektis, kvazaŭ kato skrapadus ĝin. Lia patrino ne estis kontenta pro sia fileto. Tial ŝi malpermesis ludi kun la geamikoj sur la placo.

-Fileto mia, ĝis mi ne ellernos bele skribi la alfabeton vi restos en la domo. Do, klopodu skribi bele! – diris lia patrino kaj ŝi eliris al la ĉambro.

La knabeto preskaŭ plorante komencis la skribadon, sed la literoj ne volis formiĝi, kiel la instruistino montris al li.

Li skribis per kraĵono, sed ĝia pinto rompiĝis ĉe ĉiu linio. Peĉjo devis fari novan pinton. Per la elektra akriĝilo li jam preskaŭ foruzis la tutan kraĵonon.



Liaj gepatroj devis aĉeti skribilon ĉiutage por Peĉjo. Vane oni petis lin skribi pli milde sur la papero, la knabeto forte premis la pinton de la kraĵono kaj tiel ĝia pinto preskaŭ ĉe ĉiu skriboprovo rompiĝis.

Dum la literoekzercoj Peĉjo senĉese pensis pri siaj geamikoj, kiuj jam gaje ludas sur la placo. Lian gorĝon ploro sufokadis kaj li estis tre malĝoja.

Neniam li pretiĝos. Multe da literoj estas en la alfabeto. Krome ekzistas tre malfacile skribeblaj literoj.

Li ne povos fini la ekzercon ĝis vespero. Tiam jam kien iri. Estas malhele kaj ĉiuj geknaboj estas hejme.

Li ekploris amare, tamen malgraŭ tio li ekskribis. En tiu momento denove rompiĝis la pinto de la kraĵono kaj li devis akriĝi ĝin.

Li enmetis la kraĵonon en la elektra akriĝilon, kiam iu vokis lin:

-Amiketo, estu pli indulgema al mi!

Unue Peĉjo ne sciis, kiu alparolis lin. Li ĉirkaŭrigardis, sed en la ĉambro li vidis neniun.

-Kiu parolis al mi? – demandis mire.

-Mi estas la kraĵonokoboldo.

-Kion vi deziras?

-Mi helpas ellerni la literojn.

-Ĉu vi volas helpi al mi? Kiel mi rekompencu vian helpon?

-Jes mi helpos, sed promesu al mi, ke vi estos pli indulgema! Vi ne premos forte la pinton de la kraĵono por ke ĝi rompiĝu.

-Ĉu nur tio ĉi?

-Jes.

-Kion mi faru por skribi bele? – demandis la knabeto.

La kraĵonokoboldo detale klarigis al li, kiel preni la skribilon. Grave, ke dum la skribado li maltrankviliĝu kaj ĉefe li ne deziru tuj fari la tutan taskon.

-Se vi faros pli malrapide vi povos fari pli multe ol hastante.

Peĉjo akceptis la konsilon kaj faris ĉion tiel, kiel la kraĵonokoboldo proponis al li.

Okazis miraklo. Vere ankoraŭ la unualitero estis katoskrapado, sed la ceteraj estis skribitaj, kiel perloliteroj. Kvazaŭ la instruistino estus skribinta ilin.

Apenaŭ pasis duonhoro la hejma tasko pretiĝis. Li tuj iris por montri al sia patrino.

La virino ne volis kredi, ke Peĉjo finis ĝin.

-Reiru al via ĉambro kaj faru la hejman taskon bone kaj bele. Mi ne deziras vidi katoskrapadon, kiel hieraŭ.

-Sed panjo kara, almenaŭ bonvolu rigardi ĝin – petegis la knabeto.

-Bone, mi rigardas – diris lia patrino. Ŝi preskaŭ svenis, kiam ŝi ekvidis la perloliterojn. – Kiu helpis al vi?

-Kraĵonokoboldo – venis tuj a respondo.

La virino ekridis kaj diris:

-Vi povas iri por ludi.

Peĉjo feliĉege kuregis al la placo, kie jam liaj geamikoj atendis lin.

**-Onklo Adalberto-**



# La ĉefurboj de la mondo

# La ĉefurboj de la mondo

